


Leciono 1

lernu!



 Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union



Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi publikaĵo respiegulas nur vidpunkton de la aŭtoro, pro tio la Komisiono ne povas esti respondeca pri ajna uzado de informoj, kiuj aperas ĉi tie.

La tuta enhavo, se ne estas indikite ie eksplicite io alia, apartenas al *lernu.net* kaj estas publikigita sub la permesilo [Krea Komunajo Atribuite-Nekomerce-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda](https://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/4.0/).

<https://lernu.net/instruado?lang=eo>

▼ Gramatiko



Alfabeto

La esperanta alfabeto konsistas el 28 literoj:

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ, Dd, Ee, Ff, Gg, Ĝĝ, Hh, Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll, Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ, Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz

Kelkaj literoj estas unike esperantaj:

Ĉĉ, Ĝĝ, Ĥĥ, Ĵĵ, Ŝŝ, Ŭŭ

ŭ = mallonga u.

La diftongoj aŭ, eŭ, kiuj konsistas de "a" aŭ "e" kaj la mallonga "ŭ", formas unu silabon.

Eŭ-RO-po, aŭ-TO-ro

La vortoj estas legataj strikte tiel kiel ili estas skribataj:

amiko = amiko

ĉambro = ĉambro

ĝi = ĝi

Akcento

Plursilabaj vortoj havas akcenton sur la antaŭlasta silabo:

te-le-FO-no, ra-DI-o, KAJ, a-MI-ko, ES-tas, AN-kaŭ, hi-sto-RI-o

Artikolo

Esperanto havas nur la difinan artikolon **la**. Ĝi estas senfleksia en genro, nombro kaj kazo. La artikolo indikas ke la pritraktataj objektoj, personoj aŭ aferoj estas konataj kaj difinaj, respektive jam pli frue menciitaj. Nedifinaj artikoloj ne ekzistas en Esperanto.

Seĝo estas en ĉambro. = Seĝo (iu ajn) en ĉambro. (iu ajn).

La seĝo estas mia. = La seĝo (jam menciita, precize difina) estas mia.

Personaj pronomoj

mi = mi

ĝi = ĝi

vi = vi

ni = ni

li = li

ili = ili

ŝi = ŝi

La pronomoj **li** kaj **ŝi** estas uzataj nur por personoj, t. e. viroj respektive virinoj (vira kaj ina genroj). La pronomo **ĝi** estas uzata por indiki objektojn, bestojn, aferojn kaj personojn, por kiuj oni ne precizigas la genron.

Posedaj pronomoj

La posedaj pronomoj formiĝas per la sufikso **-a** aldonata post la personaj pronomoj:

mia = mia

ĝia = ĝia

via = via

nia = nia

lia = lia

ilia = ilia

ŝia = ŝia

Substantivoj

Ĉiuj substantivoj havas la finaĵon **-o**. Gramatika genro ne ekzistas: laŭ bezono, ina genro estas indikata per sufikso **-in**.

tablo = tablo

lernanto = lernanto

lernantino = lernantino

Pluralo

La finaĵo por pluralo estas **-j**. Ĝin uzas kaj substantivoj kaj adjektivoj:

tabloj = tabloj

lernantoj = lernantoj

viaj lernantoj = viaj lernantoj

Verboj

Ĉiuj verboj havas en infinitivo la finaĵon **-i**:

lerni = lerni

labori = labori

esti = esti

La finaĵo por nuna tempo (prezenco) estas **-as**. Tiu finaĵo estas sama por ĉiu persono kaj nombro:

mi sidas = mi sidas

vi sidas = vi sidas

ni sidas = ni sidas

ili sidas = ili sidas

Ĉu?

Tio estas demanda partikulo uzata komence de la frazo, kiu transformas la deklaran frazon al la demanda:

Ĉu vi sidas? = Ĉu vi sidas?

Ĉu vi skribas? = Ĉu vi skribas?

Kiu?

Tio estas la demanda vorto havanta du signifojn:

Kiu vi estas? = Kiu vi estas?

Kiu instruisto sidas? = Kiu instruisto sidas?

-IST-

La sufikso **-ist-** indikas profesion de la persono aŭ anecon en iu movado:

instruisto = instruisto

hotelisto = hotelisto

esperantisto = esperantisto

-IN-

La sufikso **-in-** indikas la inan genron:

patro = patro

patrino = patrino

lernanto = lernanto

lernantino = lernantino

instruisto = instruisto

instruistino = instruistino

Konfirma vorto

La vorteto **jes** signifas „jes“:

Ĉu vi estas en la ĉambro? = Ĉu vi estas en la ĉambro?

Jes, mi estas en la ĉambro. = Jes, mi estas en la ĉambro.

Negacio

La vorteto **ne** signifas "ne":

Ne, mi ne estas en la ĉambro. = Ne, mi ne estas en la ĉambro.

▼ Bloko 1 (sesioj 1-2)



Lernoceloj

- ekkoni unuajn vortojn en Esperanto
- kompreni, ke ĉiuj substantivoj finiĝas per **-O**
- ekkoni la multenombran finaĵon **-J**
- ekkoni la verban finaĵon **-AS**, kiu indikas nuntempon por ĉiuj verboj
- ekkoni la sufikson **-IST-** por priskribi profesiojn

Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon, koloraj vortkartoj en kovertoj

Pretigado

- Sonoj **1, 2**
- Kopioj de **M1**
- Koloraj vortkartoj **M2**
- Kopioj de **M3**
- Kopioj de **M4**
- Kopioj de **M5**

Novaj vortoj

esti = esti

mi = mi

vi = vi

mia = mia

amiko = amiko

la = la

li = li

lernanto = lernanto

lerni = lerni

kaj = kaj

ne = ne

sportisto = sportisto

nun = nun

sidi = sidi

en = en

ĉambro = ĉambro

sur = sur

tablo = tablo

papero = papero

libro = libro

skribi = skribi

ĝi = ĝi

lernolibro = lernolibro

ĉu = ĉu

kiu = kiu

jes = jes

-IST = -IST

-AS = -AS

-O = -O

-J = -J

Lernplano

5 min Disdonu la tekston **M1** kaj aŭskultu la sonon **1**.

15 min Legu kaj traduku **M1** kune.

Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado.

Tiel la lernantoj legos la tekston plurfoje, memoros vortojn kaj ekkonos la gramatikajn finaĵojn **-O**, **-J**, **-AS** kaj la sufikson **-IST**.

5 min Nelingva paŭza ludo

20 min Ludu la ludon kun koloraj vortkartoj en 4 kovertoj. Kreu grupojn el 3 lernantoj kaj donu al ĉiu aron da kovertoj kun **M2**. Petu la grupojn kune krei frazojn kun 4 vortoj. La vortoj devas esti en la jena ordo:

- Vortoj el la ruĝa koverta
- Vortoj el la verda koverta
- Vortoj el la blua koverta
- Vortoj el la flava koverta

La vortoj estu prenitaj el la kovertoj hazarde. La celo estas ekscii, kiuj frazoj havas sencion kaj skribi ilin en kajeron. Vi povas fari konkurson: la grupo, kiu kreas kaj tradukas plej multe da frazoj, venkas. Ili ricevas tiom da poentoj, kiom da sencohavaj frazoj ili kreis.

Koloraj vortkartoj en la 4 kovertoj:

- Ruĝaj vortoj: **mi**, **amiko**, **li**, **lernanto**, **ĉambro**, **papero**, **libro**, **sportisto**, **tablo**
- Verdaj vortoj: **estas**, **sidas**, **lernas**, **skribas**
- Bluaj vortoj: **en**, **sur**
- Flavaj vortoj: **ĉambro**, **tablo**, **mi**, **papero**, **lernanto**, **li**, **ĝi**

Vi povas demandi la lernantojn, kion ili lernis – kion laŭ ili signifas la diversaj finaĵoj? Klarigu rapide la signifon de la finaĵoj **-O**, **-J**, **-AS** kaj la sufikso **-IST**.

10 min Paŭzo

20 min Disdonu la dialogon **M3**.

Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.

5 min Nelingva paŭza ludo

20 min Disdonu la kanton **M4**. Traduku la kanton kune kaj kantu ĝin 2-3-foje.

Donu hejmtaskojn

M1 Teksto

Amiko Marko (1-a parto)

Marko estas mia amiko. Li estas lernanto kaj sportisto.

Li nun sidas en ĉambro kaj lernas. Sur tablo estas paperoj kaj libroj. Ĝi estas skribotablo. La libroj sur la tablo estas lernolibroj.



mi

amiko

li

lernanto

ĉambro

papero

libro

sportisto

tablo

estas

sidas

lernas

skribas

en

sur

ĉambro

tablo

mi

papero

lernanto

li

ĝi

M3 Dialogo

Petro Mi estas Petro. Kiu vi estas?

Ana Mi estas Ana. Ĉu sur la tablo estas lernolibroj?

Petro Jes. Kiuj libroj estas en la ĉambro?

Ana Lernolibroj.

Petro Ĉu vi skribas?

Ana Ne, mi lernas.



M4 Kanto

Ĉu lernantoj?

Ĉu lernantoj, ĉu lernantoj


sidas nun, sidas nun,

en la lernoĉambro,

en la lernoĉambro,

Ĉu? Ĉu? Ĉu?, Ĉu? Ĉu? Ĉu?

Melodio: adaptita el la franca kanto Frère Jacques



M5 Hejmtasko

Trovu, kio estas malĝusta, kaj korektu ĝin.

Amiko Marko

Marko estas mia ĉambro.

Li estas lernanto kaj paperoj.

Li nun estas en ĉambro kaj lernas.

Sur tablo estas ĉambro kaj libroj.

Ĝi sidas skribotablo.

La amiko sur la tablo estas lernolibroj.

▼ Bloko 2 (sesioj 3-4)



Lernoceloj

- ripeti kaj uzi vortojn el la antaŭaj lecionoj
- uzi novajn vortojn
- uzi la finaĵojn **-O**, **-J**, **-AS** kaj la sufikson **-IST** kaj ripeti iliajn signifojn

Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon, koloraj vortkartoj en kovertoj

Pretigado

- Sonoj **3, 4**
- Koloraj vortkartoj **M6**
- Kopioj de **M7**
- Kopioj de **M8**
- Kopioj de **M9**
- Kopioj de **M10**

Novaj vortoj

ho = ho

instrui = instrui

ŝi = ŝi

via = via

sporti = sporti

Lernplano

15 min

Ludu la ludon kun koloraj vortkartoj en 4 kovertoj. Kreu grupojn el 3 lernantoj kaj donu al ĉiu aron da kovertoj kun **M6**. Petu la grupojn kune krei frazojn kun 4 vortoj. La vortoj devas esti en la jena ordo:

- Vortoj el la ruĝa koverta
- Vortoj el la verda koverta
- Vortoj el la blua koverta
- Vortoj el la flava koverta

La vortoj estu prenitaj el la kovertoj hazarde. La celo estas ekscii, kiuj frazoj havas sencion kaj skribi ilin en kajeron. Vi povas fari konkurson: la grupo, kiu kreas kaj tradukas plej multe da frazoj, venkas. Ili ricevas tiom da poentoj, kiom da sencohavaj frazoj ili kreis.

Koloraj vortkartoj en la 4 kovertoj:

- Ruĝaj vortoj: **mi, amiko, li, lernanto, ĉambro, papero, libro, sportisto, tablo**
- Verdaj vortoj: **estas, sidas, lernas, skribas**
- Bluaj vortoj: **en, sur**
- Flavaj vortoj: **ĉambro, tablo, mi, papero, lernanto, li, ĝi**

Vi povas demandi la lernantojn, kion ili lernis – kion laŭ ili signifas la diversaj finaĵoj? Klarigu rapide la signifon de la finaĵoj **-O, -J, -AS** kaj la sufikso **-IST**.

5 min

Kantu la kanton **M7** kune 2-3-foje.

5 min

Nelingva paŭza ludo

10 min

Legu kaj traduku **M8** kune. Priparolu la signifon de la gramatikaj finaĵoj **-O, -J, -AS** kaj la sufikso **-IST**.

Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado.

Tiel la lernantoj legos la tekston plurfoje, memoros vortojn kaj ekkonos la gramatikajn finaĵojn **-O, -J, -AS** kaj la sufikson **-IST**.

10 min

Memorigu al la lernantoj, ke ili devis fari hejmtaskojn – ili devis korekti frazojn. Petu ĉiun studenton legi unu frazon kaj traduki ĝin.

10 min

Paŭzo

20 min

Disdonu la dialogon **M9**.

Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.

5 min

Nelingva paŭza ludo

20 min

Ludu la Vortpilkan ludon por lerni kaj ripeti vortojn. Petu lernantojn formi cirklon. Ĵetu la pilkon al unu el la lernantoj kaj diru vorton en la nacia lingvo, kiun la lernantoj jam lernis en Esperanto. La lernanto kun la pilko tradukas la vorton al Esperanto. Poste li aŭ ŝi povas ĵeti la pilkon al alia lernanto kaj diru vorton, kiun tiu traduku al Esperanto, ktp. Se la lernanto ne konas la ĝustan vorton, la instruisto diras alian vorton, ĝis la lernanto respondos ĝuste. Poste li aŭ ŝi povas pluĵeti la pilkon.

Donu hejmtaskojn

mi

amiko

li

lernanto

ĉambro

papero

libro

sportisto

tablo

estas

sidas

lernas

skribas

en

sur

ĉambro

tablo

mi

papero

lernanto

li

ĝi

M7 Kanto

Ĉu lernantoj?

Ĉu lernantoj, ĉu lernantoj
sidas nun, sidas nun,
en la lernoĉambro,
en la lernoĉambro,
Ĉu? Ĉu? Ĉu?, Ĉu? Ĉu? Ĉu?

Melodio: adaptita el la franca kanto Frère Jacques



Amiko Marko (1-a parto)

Marko estas mia amiko. Li estas lernanto kaj sportisto.

Li nun sidas en ĉambro kaj lernas. Sur tablo estas paperoj kaj libroj. Ĝi estas skribotablo. La libroj sur la tablo estas lernolibroj.



M9 Dialogo

- Ana** Ĉu vi lernas nun en ĉambro?
Petro Jes. Kaj vi?
Ana Mi sidas sur lernolibro.
Petro Ho!
Ana Lernantoj lernas. Ĉu vi lernas?
Petro Ne. Mi skribas sur papero.
Ana Ĉu la instruisto sportas?
Petro Ne. Ĉu libro sur la tablo estas via?
Ana Ne. La libro ne estas mia, ĝi estas via.



M10 Hejmtasko

Lernantoj metas la vortojn el la Teksto **1** al la ĝusta loko en la tabelo.

Verbo	Substantivo	Prepozicio

▼ Bloko 3 (sesioj 5-6)



Lernoceloj

- uzi novajn vortojn
- formi demandajn frazojn per la partikulo **ĉu** kaj per la pronomo **kiu**
- ekkoni la sufikson **-IN-**, kiu markas inan genron de substantivo
- krei novajn vortojn per jam konataj vortoj kaj sufiksoj

Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon, koloraj vortkartoj en kovertoj

Pretigado

- Sonoj **5, 6, 7**
- Koloraj vortkartoj **M11**
- Kopioj de **M12**
- Kopioj de **M13**
- Kopioj de **M14**

Novaj vortoj

patro = patro

patrino = patrino

de = de

ili = ili

labori = labori

laboristo = laboristo

hotelo = hotelo

instrui = instrui

lia = lia

instruistino = instruistino

vidi = vidi

Esperanto = Esperanto

kio = kio

lingvo = lingvo

ni = ni

respondi = respondi

-IN- = -IN-

Lernplano

20 min

Ludu la ludon kun koloraj vortkartoj en 5 kovertoj. Kreu grupojn el 3 lernantoj kaj donu al ĉiu aron da kovertoj kun **M11**. Petu la grupojn kune krei frazojn kun 4 vortoj. La vortoj devas esti en la jena ordo:

- Vortoj el la bruna koverto
- Vortoj el la ruĝa koverto
- Vortoj el la verda koverto
- Vortoj el la blua koverto
- Vortoj el la flava koverto

En frazoj kun la vorto **kiu**, ruĝaj kartoj ne estu uzataj!

Priparolu la signifon de la vortoj **ĉu** kaj **kiu**. Kion ili signifas? Kial ili staras komence de la frazo?

La vortoj estu prenitaj el la kovertoj hazarde. La celo estas ekscii, kiuj frazoj havas sencon kaj skribi ilin en kajeron. Vi povas fari konkurson: la grupo, kiu kreas kaj tradukas plej multe da frazoj, venkas. Ili ricevas tiom da poentoj, kiom da sencohavaj frazoj ili kreis.

Koloraj vortkartoj en 5 kovertoj por krei demandajn frazojn:

- Brunaj kartoj: **ĉu**, **kiu** (ne uzu ruĝajn kartojn en frazoj kun la vorto **kiu**)
- Ruĝaj vortoj: **mi**, **amiko**, **li**, **lernanto**, **ĉambro**, **papero**, **libro**, **sportisto**, **tablo**
- Verdaj vortoj: **estas**, **sidas**, **lernas**, **skribas**
- Bluaj vortoj: **en**, **sur**
- Flavaj vortoj: **ĉambro**, **tablo**, **mi**, **papero**, **lernanto**, **li**, **ĝi**

5 min

Nelingva paŭza ludo

5 min

Disdonu la tekston **M12** kaj aŭskultu la sonon **4**.

15 min

Legu kaj traduku **M12** kune.

Petu lernantojn legi po 2 frazoj kaj traduki ilin denove. Kiam ili atingas finon de la teksto, ili rekomencas sed ĉi-foje sen traduko. La instruisto helpas nur kun ĝusta elparolo kaj, se necese, kun tradukado.

Tiel la lernantoj legos la tekston plurfoje, memoros vortojn kaj ekkonos la gramatikajn finaĵojn **-O**, **-J**, **-AS** kaj la sufiksojn **-IST**.

10 min

Paŭzo

10 min

Kreu vortojn kune. Petu lernantojn diri al vi la signifon de la vortfinaĵoj **-O**, **-J**, **-AS**, la sufiksoj **-IST** kaj **-IN** kaj la posedajn pronomojn **MIA**, **VIA**, **LIA**, **ĜIA**. Priparolu mallonge. Memorigu al la lernantoj, ke ili jam lernis multajn novajn vortojn; ili povas rigardi ĉiujn vortotabelojn el la leciono **1**. Nun diru al ili, ke kun tiu scio ili jam povas krei novajn vortojn. Kiel? Ili prenas vorton kaj aldonas sufiksojn al ĝi. Tiel ili ŝanĝas la signifon de vortoj.

Donu kelkajn ekzemplojn aŭ kreu ilin kune. Ekzemple: **sporto**, **sportisto**, **sportistino**, **sportoj**, **sportistinoj**, **instruas**, **instruisto**, **instruistinoj**, **mi**, **mia**, **miaj**, **vi**, **via**, **viaj**

Nun petu la lernantojn krei siajn proprajn vortojn kaj skribi ilin.

Vi ankaŭ povas fari konkurson: kiu povas krei plej multe da sencohavaj vortoj en 5 minutoj?

10 min

Disdonu la dialogon **M13**.

Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin.

5 min

Nelingva paŭza ludo

15 min

Revenu al **M13**.

Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.

5 min

Disdonu la kanton **M14**. Traduku la kanton kune kaj kantu ĝin 2-3-foje.

Donu hejmtaskojn

ĉu

kiu

mi

amiko

li

lernanto

ĉambro

papero

libro

sportisto

tablo

estas

sidas

lernas

skribas

en

sur

ĉambro

tablo

mi

papero

lernanto

li

ĝi

Amiko Marko (2-a parto)

La patro kaj la patrino de mia amiko ne estas en la ĉambro. Ili nun laboras.

Lia patro estas laboristo, li laboras en hotelo.

La patrino instruas. Ŝi estas instruistino.



M13 Dialogo

- A** Kio estas en la ĉambro, ĉu vi vidas?
- B** Mi ne vidas. Ho, en la ĉambro estas tablo kaj libroj.
- A** Ĉu Maria estas en la ĉambro?
- B** Ne, mi ne vidas.
- A** Kiu instruas?
- B** Jozefo instruas.
- A** Ĉu Jozefo estas instruisto?
- B** Jes. Li nun sidas.
- A** Kiuj lernantoj lernas?
- B** Mi vidas. Marko, Ana kaj Petro.
- A** Kio estas sur iliaj tabloj?
- B** Paperoj, libroj.
- A** Ĉu la libro de la instruisto estas sur la tablo?
- B** Ne. Sur lia tablo estas paperoj.




M14 Kanto

Ni amikas

Ni amikas, ni amikas,
vi kaj mi, vi kaj mi.

En la lernoĉambro,
en la lernoĉambro,
skribas ni, skribas ni.

Melodio: Frère Jacques



M15 Hejmtasko

Ĉiu lernanto skribas kvin demandojn.

Ĉiu lernanto lernas ĉiujn vortojn (ĉiutage 6 vortojn).

▼ **Bloko 4** (sesioj 7-8)



Lernoceloj

- ripeti kaj uzi vortojn kaj gramatikon el la antaŭaj lecionoj

Bezonataj instruiloj

- komputilo por ludi sonon, koloraj vortkartoj en kovertoj

Pretigado

- Kopioj de **M17**
- Kopioj de **M18**

Novaj vortoj

ankaŭ = ankaŭ

respondi = respondi

Lernplano

5 min

Petu la lernantojn legi la tutan tekston **M16** denove, sen traduki ĝin. Ĉiu lernanto legas du frazojn.

15 min

Ludu la ludon kun koloraj vortkartoj en 5 kovertoj. Kreu grupojn el 3 lernantoj kaj donu al ĉiu aron da kovertoj kun **M11**. Petu la grupojn kune krei frazojn kun 4 vortoj. La vortoj devas esti en la jena ordo:

- Vortoj el la bruna koverto
- Vortoj el la ruĝa koverto
- Vortoj el la verda koverto
- Vortoj el la blua koverto
- Vortoj el la flava koverto

En frazaj kun la vorto **kiu**, ruĝaj kartoj ne estu uzataj!

La vortoj estu prenitaj el la kovertoj hazarde. La celo estas ekscii, kiuj frazoj havas sencon kaj skribi ilin en kajeron. Vi povas fari konkurson: la grupo, kiu kreas kaj tradukas plej multe da frazoj, venkas. Ili ricevas tiom da poentoj, kiom da sencohavaj frazoj ili kreis.

Koloraj vortkartoj en 5 kovertoj por krei demandajn frazojn:

- Brunaj kartoj: **ĉu, kiu** (ne uzu ruĝajn kartojn en frazoj kun la vorto **kiu**)
 - Ruĝaj vortoj: **mi, amiko, li, lernanto, ĉambro, papero, libro, sportisto, tablo**
 - Verdaj vortoj: **estas, sidas, lernas, skribas**
 - Bluaj vortoj: **en, sur**
 - Flavaj vortoj: **ĉambro, tablo, mi, papero, lernanto, li, ĝi**
-

5 min

Nelingva paŭza ludo

20 min

Disdonu la dialogon **M17**.

Dividu la lernantojn en duopojn kaj petu ilin legi la dialogon kaj traduki ĝin. Petu unu duopon laŭtlegi la dialogon kaj traduki ĝin linion post linio. Helpu ilin kun tradukado, se necese. Poste petu tiun duopon ludi la dialogon sen traduki ĝin denove. Se estas tempo, vi povas peti aliajn duopojn ludi la dialogon.

10 min

Paŭzo

20 min

Disdonu **M18**.

Petu la lernantojn kompletigi la frazojn.

5 min

Nelingva paŭza ludo

10 min

Revenu al **M13** el la antaŭa bloko. Petu la lernantojn legi ĝin denove kaj dividi ilin en duopojn. Ĉiu duopo ludu la dialogon sen traduki ĝin.

10 min

Kantu la kantojn **M4** kaj **M14** kune 2-3-foje.

Donu hejmtaskojn

Amiko Marko (1-a kaj 2-a partoj)

Marko estas mia amiko. Li estas lernanto kaj sportisto.

Li nun sidas en ĉambro kaj lernas. Sur tablo estas paperoj kaj libroj. Ĝi estas skribotablo. La libroj sur la tablo estas lernolibroj.

La patro kaj la patrino de mia amiko ne estas en la ĉambro. Ili nun laboras.

Lia patro estas laboristo, li laboras en hotelo.

La patrino instruas. Ŝi estas instruistino.



M17 Dialogo

- A** Kiu estas amikino de Marko?
B Ana. Ĉu ŝi estas en la ĉambro?
A Jes, ankaŭ via amikino Klara sidas en la ĉambro.
B Kiu instruisto instruas?
A Ne estas instruisto. Estas instruistino Paola.
B Mi vidas. En la ĉambro estas lernantinoj kaj lernanto.
A Kiu lernantino estas via amikino?
B Ana.



M18 Ekzerco

Kompletigu la frazojn.

Marko estas en la _____.

_____ sidas sur seĝo.

Instruisto instruas. Laboristo _____. Lernanto _____.

Marko kaj Petro estas lernant _____ kaj sportist _____.

La patrino _____ Marko estas instruistino.

La seĝo estas en _____ ĉambro.

La libro estas de li, ĝi estas li _____.

Mia nomo est _____ Marko.

M19 Hejmtasko

Lernantoj metas la vortojn el la Teksto **1** al la ĝusta loko en la tabelo.

	-o	-ist-o	-j	istin-o
sport				
instru				
lernant		-		-in-o
amik		-		-in-o
paper		-		-